**Universala Esperanto-Asocio** | **AKTIVULA MATURIGO**


**Estrara Subteamo: MOVADO**

Estrara Komuniko EKO 2015-01 sendita el Weißwasser la 2an de januaro.



# Helpiloj por via informa laboro – fruktoj de AMO


Pasis tri el la kvar tagoj de la oka AMO-seminario kadre de la junulara renkontiĝo JES. Jen resumo pri la marda programo, kiun gvidis Petro Balaž el Slovakio pri la vasta temo ‘Informado’. Ni aldonis al la sendita teksto la du lumbildajn prezentojn, kiujn li uzis: la unua temas pri informado en la tradicia senco – budo-starigo kaj prizorgo kaj pliaj rimedoj, la dua specife pri la ebloj uzi retajn komunikilojn. Ricevintoj estis invititaj uzi tiujn materialojn kadre de siaj propraj programoj.




Pri budo-prizorgo, gravas bonaj antaŭ-preparoj, sed necesas konscii ke povos leviĝi obstakloj: teknikaĵoj povas panei aŭ kontraŭ-atende manki. La fizikaj kondiĉoj povas esti aliaj ol atendite - sciu elturniĝi. Ofte la informado ne estas tia, ke ĝi celas tuj konvinki, sed havi kumulan efikon – multfoja kontakto necesas por veki scivolon kaj lernemon. Flanka informado povas sukcesi, kie rekta aliro ne konvenus– ligu Esperanton kun aliaj temoj, ekzemple prelegoj pri ekzotikaj landoj vizititaj pere de Eo, aŭ informado pri alicela projekto starigita flanke de esp-istoj.

Apude: unu lumbildo el la prezentoj.

La prezento pri retuzo estis ampleksigita en la posta tago per prezentaĵo kaj diskutado sub gvido de Judith Meyer pri la transformoj okazantaj kaj ekspluatendaj ĉe la nuna reto – t.n. reto 2.0 kontraste al Reto 1.0, tiu, kiu ekzistis en la komenco de la retepoko. La ilustraĵo montras, ke en 1.0 la ricevantoj estis limigitaj kaj la informfluo ĉefe unudirekta – de saĝulo al konsumantoj. En reto 2.0 aldoniĝas multaj novaj retuzantoj kaj la informfluo estas mult-direkta. Lau diraĵo atribuita al Andy Warhol en 1968 (kiam reto 1.0 ne ekzistis): “En la estonto, ĉiu estos fama dum 15 minutoj.”





Jen la silvestronokta foto de la seminarianoj kune kune kelkaj pliaj JES-uloj.

Dum JES ni revivigis la delongan deziron pri propra retpaĝaro pri AMO – atendeble tio aperos frue en la nova jaro, tiel ke AMO-materialoj estu ĉiam ajn alireblaj.

PS: Vikia prezento ja estis starigita baldaŭ poste, http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

Sed nur nun (nov 2015) ni laboradas, por ke plena retejo ekfunkciu, kun elŝuteblaj dokumentoj, ilustritaj tekstoj kaj ebloj komenti kaj suplementi erojn.

========================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Vortoj en la dissendita komuniko: 290

Tekstoj aldonitaj nun, en novembro 2015 aperas verde; aldonitaj estas bildoj.

Sendita en la 2a de januaro 2015 kun du alkroĉaĵoj de la prezentaĵoj de Petro Balaž:

- Prezentado de Esperanto.ppt (101 KB)
- Esperanto kaj Interreto.pptx (58KB)

PDF farita de Nuance Power PDF.